

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Finigis la 2020-a Jarkunveno de nia rondo

En la 26a de januaro, ĉe nia kutima kunvenejo (Kanagawa Kenmin-Sentaa), ni havis la jarkunvenon de la Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama. El ĝiaj 49 anoj, ĉeestis 17 anoj, kaj kun 18 mandatoj, jenaj aferoj estis fiksitaj. Post la decidoj 1 ano alvenis.

1. Jarraporto kaj kasraporto, por 2019, kun revizia konsento.
2. Jarplano kaj buĝeto por 2020.
3. Por la fondota muzeo, s-ro Doi Hirokaz estu la estro de la prepara komisiono, kun partopreno de s-ro Sibayama Zyun'iti, la Prezidanto. Aliaj komisionanoj estos poste nomumitaj.
4. S-ro Iwaya Mituru estu speciala kaskonsilanto, kiu okaze de grandsuma pago rajtas interveni.

Eseo pri filmeto el Jokohamo

Memora movbildo por nova trajnlinio de Sotetsu

'Trajno de 100 Jaroj'

Namba Fumiharu

☆ YouTube: <https://youtu.be/tUe6YedzjIM>

☆ (Aŭ serĉi en YouTube per '100 YEARS TRAIN')

☆ Nur japanlingva, sed paroloj ne estas multaj

La fervoja kompanio Sotetsu (formala nomo: Sagami Tetsudō) jam longe veturigis trajnojn inter sia centra stacidomo Yokohama kaj mezgranda urbo Ebina, trapasante okcidentan periferian areon de Jokohamo. Dum lastaj jardekoj, tiu eks-kampara areo kreskis kiel granda rezideja kvartalo, kaj ankaŭ la kompanio Sotetsu sufiĉe grandiĝis kiel unu el 'ĉefaj fervojaj kompanioj en Japanio'. Tamen, tiu areo preskaŭ ne havas famajn lokojn por nelogantoj, kaj tial la populareco estas limigita nur tra Jokohamo kaj ĉirkaŭa regiono.

Ekzemple, satelita urbo Futamatagawa, kiu estas la plej granda kvartalo ĉirkaŭ la linioj

de Sotetsu, estas famkonata nur pro la situo de gubernia oficejo de ŝofora permesilo. Tial, multaj Jokohamanoj slange esprimas jen 'iri al Futamatagawa' por 'renovigi mian permesilon'...

Ekde 30a de novembro 2019, nova linio de Sotetsu ekfunkciis. Kvankam tiu linio estas tre mallonga (kun nur unu nova stacio), ĝi ligas la ĉeflinion de Sotetsu al la linio de JR (Japan Railway/japana fervojo, eksa nacia fervojkompanio). Utiligante la novajn trajnojn tra la linio, oni povas vojaĝi rekte inter stacioj de Sotetsu, ekzemple Futamatagawa, kaj urbocentroj de Tokio, precipe Shibuya aŭ Shinjuku.

Ĝi estas treege granda revolucia ŝanĝo, por ne nur loĝantoj sed ankaŭ la kompanio Sotetsu mem. La valoro de nmoveblaĵoj ĉirkaŭ la fervojlinioj, kiujn Sotetsu kreskigis jam longe, plue plimultiĝas pro la nova trajnservo. Ja, ĝi estas bonega komerca ŝanco! Se Sotetsu sukcesos reklami sin kiel bonŝajna kaj moda fervojkompanio, la kvartaloj plue prosperiĝos kaj populariĝos.

Je la 27a de novembro, antaŭ tri tagoj ol la malfermo de la nova linio, Sotetsu eldonis reklaman movbildon ‘100 Years Train’ (Trajno de 100 Jaroj) sur YouTube. Por la kompanio Sotetsu, ĝi estas ne normala reklamfilmeto, sed pli disvastiginda ‘memora movbildo’, kun la longeco je pli ol 3 minutoj. Sotetsu planis krei tiun movbildon ekde antaŭlonge, kaj mendis tiun kreadon al lertaj filmartistoj, popmuzikistoj, kaj aliaj diversaj artistoj.

Por esprimi longan historion 100 jaran de la fervojo, oni kolektis multajn historiajn dokumentojn, kaj laŭeble precize rekreis kvar entrajnajn scenejojn de jenaj epokoj laŭ japana epoknomo Gengō; Taishō, Shōwa, Heisei kaj Reiwa. Por dramo, elektitis du junaj popularaj geaktoroj Sometani Shōta kaj Nikaidō Fumi, kiuj antaŭe sukcesis gajni la Premion de Marcello Mastroianni en Venecio. Klarigo oficiala de la movbildo estas jene...

‘Koincide la viro kaj virino renkontiĝis en trajno. Rigardinte ili tuj ekamis unu la alian... Tamen la viro devis eliri de trajno por transigo kaj ili dividitis. Tiu romanco estis ripetita tra la tempo... en ĉiuj epokoj de Taishō, Shōwa, Heisei

kaj Reiwa. Nun post 100 jaroj, ĉu ili povas esti ligita unu la alian?’

Ekde la publikigo, surrete la movbildo ricevis multegajn bonajn ŝatojn kaj aplaŭdojn el junuloj. Dum unu monato ĝi sukcesis gajni pli ol du milionojn da vidoj. Sendube, tiu movbildo estas bonega frukto de multaj geniaj artistoj. Tamen, povas esti ke la movbildo estas malfacile komprenebla por mezaĝuloj kaj maljunuloj. Por skribi ĉi tiun eseon, mi prezentis la movbildon al miaj Esperanto-klasanoj, kiuj ĉiuj estas pli maljunaj ol mi. Tamen ili ne povis havi bonan impreson al la movbildo... Supozeble, ĝi fokusas trafi emociion de relative junaj generaciuloj, kiuj povos future elekti la kvartalojn ĉirkaŭ Sotetsu por aĉeti novajn domojn. Nu, forte staras muroj kulturaj inter generacioj juna kaj olda! (Kaj mi eble staras en juna flanko, ĉar mi tute emociiĝis pro la movbildo...)

Nun... En la dramo, ĉu la viro kaj virino finfine povis ligiti unu la alian? Tamen, skribi tiun rezulton ĉi tie estas ne taŭge por vidontoj. Anstataŭe, mi prezentu unu frazon kiun la virino diris, kiam la viro eksciis pri la merito de nova linio...

‘Kawatta mitai nandesu’
 ‘(Ŝanĝiĝis, supozeble)’

Ja, la nova trajnlinio de Sotetsu ŝanĝis la destinon ripetitan de la geamantoj. Kaj krome ĝi povos ŝanĝi la futuron de la kvartaloj, kaj kompanio Sotetsu mem. Jen, kiom da ŝanĝoj atendos? Ĉu la ‘ŝoforpermesila’ kvartalo Futamatagawa povos ŝanĝi sin al ĉarma, prospera, kaj loĝinda urbo?



Reklamo en trajno informas pri la memora movbildo de Sotetsu.

Eseoj pri klasikaj filmoj

“Foriĝinta kun la vento”

Mizro Iwaya

Tiu ĉi fama romano estas verkita de usona verkisto Margaret Mitchell kaj eldonita en la jaro 1936. Ĝi kaŭzis grandan sensacion kaj vendiĝis tre multe; furora libro en tiu jaro kaj ankaŭ en la sekva jaro. La dinamika strukturo de la romano, inkluzive de la civila milito, estas tre incita, precipe kun la heroino, tromemfida Scarlett O'Hara. La aŭtoro montris la mondon kiu interesas nin sed kiun ni ne povis sperti. La historio havas montojn kaj valojn, okazas diversaj epizodoj en la jaroj de usona tumulto. Amaferoj estas plektitaj en historiaj faktoj.

Ĝi estis surfilmigita en Holivudo kaj publikigita en 1939. La ĉefheroino estis Vivien Leigh kaj la ĉefheroo estis Clark Gable. Oni diras ke tio estas ĝuste la kombino de belulino kaj belulo: ora vojo de furora kinofilmo. La jaro 1939 estas ĝuste la komenco de la dua mondomilito. Estis granda tumulto en Eŭropo, sed tute paca estis Usono, tial oni forkonsumis egan kvanton da mono por tiu filmo. Kaj ankaŭ la kinofilmo ekhavis grandan furoron kaj grandan profiton. Eĉ nun mi ofte vidas ĝian vendon en DVD-butikoj.

Trie, mi volas diri ke ankaŭ la muziko de la kinofilmo estas tre populara. Ĝi estis komponita de Max Steiner, tiama meza komponisto en Usono. La ĉefa temo de civila milito donis grandiozan dinamikon al la melodio. Ĝi ricevis bonan aŭdiencon, sed ne estis premiita en la akademio. Lastatempe mi vidis en japana televido ke tiu ĉi muziko elektiĝis "la plej ŝatata kinomuziko" el multaj famaj muzikpecoj. Jes, ankaŭ japanoj amas ĝin.

Nun, mia edzino kaj mi ofte plenumas tiun muzikpecon en nia koncerto. Mi rimarkas ke la reago de la aŭskultantoj estas tre favora, eĉ entuziasma. Tio senatende surprizis nin ĉe la unuaj plenumoj, ĉar la muziknoto mem ne estas malfacila, eĉ simpla. Sed kredeble ĝi impresas ilin pro la grandiozeco. Tia muziko kortuŝas nin. Tia estas bona muziko.

La filmo; “Laŭrenco de Arabujo”

Tanigaŭa Hiroŝi

Ĉe la kinejo en Kamioooka, Jokohamo oni prezentas filmon ĉiutage je la 10a horo. La filmoj estas famaj malnovaj prezentaĵoj iam vaste spektitaj, ekzemple; Libertago en Romo, Matenmanĝo ĉe Tiffany, Baptopatro (ゴッドファーザー), Foriĝinta kun la vento, Sep Samurajoj, La Monto Hakkooda, ktp.

La 15an de januaro mi spektis la filmon “Laŭrenco de Arabujo.” Ĝi estis prezentita ekde 1962, en 1963 en Japanio. La prezento-enspezo superis, laŭdire, 700 milionajn dolarojn.

Ĝia prezentohoro estis 3 horoj kaj 37 minutoj.

La loko estis nordorienta regiono de la Ruĝa Maro. La tempo estis post 1916 kiam Britujo kune kun Francujo estis morte militanta kontraŭ la German-Aŭstria-Turka Alianco. Brita armeo celis senigi la forton de la turka armeo el ĉi tiu regiono.

Brita oficiro Laŭrenco marŝas sur la mortoriska dezerto gvidante la taĉmenton el beduenoj. Li montris eksterordinaran kuraĝon kaj kapablon savinte la vivon de beduena knabo el krizo de morto en dezerto. La beduenoj tutkore lin konfidis kaj kuraĝege ekbatalis. Laŭrenco amis ilin. Lia taĉmento sukcesis domini la fortuson de Akabo, strategie gravan por brita armeo, detruis la turkan fervojon duloke kaj fine sukcesis okupi Damaskon, ĉefurbon de Sirio. Dume Laŭrenco afliktiĝis de la krueleco de la batalantaj beduenoj. Okazis masakroj kun krioj; “Estu neniu militkaptitoj!”

Britio promesis al la araboj per la sekreta “Hussein-Makmahon-Traktato” la subtenon de la postmilita sendependiĝo de la araboj regataj de Osman-Turkujo. Sed Laŭrenco eksciis pri alia sekreta “Saiks-Piko-Traktato” en kiu Britujo, Francujo kaj Rusujo sekrete interkonsentis, ke la arabaj teritorioj regataj de Turkujo estu dividitaj post la Milito, de Britujo, Francujo kaj Rusujo. Ambaŭ kontraktoj estis kontraŭdiraj. La beduenoj sub la komando de Laŭrenco vivriske batalis kredante la futuran sendependiĝon. Laŭrenco ĉagreniĝas. Li afliktiĝis ankaŭ pro

la orgojla reciproka interbatalemo inter arabaj triboj.

La ĉefo de la arabo deklaris al Laŭrenco: *“Junuloj batalis. Sed la milito finiĝis. Batalistoj estas senbezonaĵ. Pacon faros maljunuloj.”* Laŭrenco retiriĝis de la militservo desaponiĝe.

La tuta scenaro estis esence historia aktualaĵo.

La modelo de Laŭrenco estis Thomas Edward Lawrence (1888~1935). Li estis priaraba arkeologo, militservis por produkto de armeaj

mapoj en arabaj regionoj kaj ceteraj. Post la fino de la militservo li mortis 46jara pro la akcidento de motorciklo.

Ankaŭ Laŭrenco en la filmo mortis en ĝi pro motorcikla akcidento.

Mi kore simpatiis Laŭrencon kovintan en si profundan afliktiĝon estante meze inter la koloniisma artifikaĉo de sia patrolando kaj la troa interbatalemo inter arabaj potencoj, kies sendependiĝon li koraspiris helpi.

Opinio de legantoj

Pri Elektra Skotero

Yoshie Kleemann

Dankon pro la sendoj de via gazeto. Ni ĝuas ĉiam legante ĝin.

Ĉi-foje Mi legis la artikolon pri "Elektra Skotero" en n-ro 354.

Vi ĝuis uzante ĝin en Berlino.

En Germanio ĝuste pro tio ni havas multe da problemoj. Ni havas stratojn por aŭtoj, piedirantoj kaj ofte por bicikloj. Sed ni ne havas stratojn por la Elektraj Skoteroj. La aŭtokondukantoj lernas la trafikajn regulojn praktike kaj teorie kaj ekzameniĝas. La malgrandaj lernantoj kiuj veturas bicikle al lernejo devas havi ambaŭajn ekzamenojn. La kondukantoj de Elektra Skotero

ne rajtas uzi la stratojn de piedirantoj kaj biciklantoj. Ili devas uzi nur aŭtostratojn. Ĝis nun ili kaŭzas tre ofte akcidentojn pro nekono de reguloj. Do, ĉe ni pro la ellastuba gaso de aŭtomobiloj oni enkondukis rapide tiun novan veturilon elektran sen malpurigo de urba aero.

En nia urbo ni trovas E.S. ĉie ajn kiel rubaĵo senorde sur iu loko. Bedaŭrinde ili ne havas oficialan parkejon kiel por bicikloj kaj aŭtomobiloj. Ĝis nun ni ne havas iun regulon pro ĝi.

Kiel eksterlandano se vi havus akcidenton ĉe ni tio estos tre malagrabla. Mi ne konsilas vin la uzadon de tiu veturilo.

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohama)

Niaj Planoj

*feb. 16 [ĉambro en la Domo de JICA] Prelego Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havos prelegon – S-ino Doi Ĉieko parolos pri Verda Majo, japanino batalinta en Ĉinio kontraŭ japana militarismo, kaj verkadis en Esperanto. Poste ni havos okazon prezenti Esperanton mem.

*mar. 7 [KK] La 118-a Legokunsido: Ĉi-foje ne estas antaŭelektita teksto. La partoprenantoj

elektas libron interesan al si, kaj prezentos ĝin. *mar. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero kun gasto, s-ro J-MENT. Kun tia pseŭdonomo, li verkis scenaron de la komputila ludo “Amrilato”, en kiu rolas lingvo Juliamo, kio fakte estas Esperanto. La ludo jam havas duan version, anglalingvan version ktp. Li rakontos, kiel kaj kial tiuj ludoj simpatias al la Esperanto-mondo.

Okazis

*jan. 26 (dim) [KK] La jarkunsido. Pri tio legu p.1.